

# ESPERANTOLEHTI



Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ syyskuu ♦ septembro ♦ 4/2013



**Rejkjaviko – malgranda kaj  
intima Esperanto-kongreso**

**Premioj dum la Universala Kongreso, p. 4–5**

♦ **Esperanta feriado en Kroatio, p. 8–9**

♦ **Esperanto – taŭga ilo por sociaj luktantoj, p. 12–13**

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.

Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo:** ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*

Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisnpaja.info

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 24 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

**Pankkitili/Bankkonto:** FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

**Julkaisija/Utgivare/Eldonanto:** Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

**Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto:** 330

**Kansi/Pärm/Kovrile:** Solena Malfermo. Foto: *Robert Bogenschneider*.

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Sekretario/Sihtööri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**

*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314, tiina.kosunen945@gmail.com

*Paula Niinikorpi*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

*Jukka Nikoskeläinen*, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 ✉ juknik@utu.fi

*Keith (Keke) Uber*, Poutapolku 3 B 30, 02110 Espoo. ☎ 040 413 4252 ✉ keith\_uber@yahoo.com

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**

*Tapani Aarne*, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi

*Robert Bogenschneider*, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de

*Börje Eriksson*, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Danske Bank 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

**Internet:** www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando au twitter.com/#!/finnlando

## Kostoj altiĝas, ni devas enspezi

Ni, la Finnlanda esperantistaro, jam de 32 jaroj posedas propran hejmon en la ĉefurbo. Dank'al kuraĝa iniciato kaj komuna fortostreĉo fine de la 1970-aj, EAF kolektis akciojn de po kvincent tiutempaj markoj por "Fondaĵo Propra Ejo". Kovrilpaĝo de ĉi tiu gazeto 3/1980 (miaj dikiĝoj):

"Esperanto-Asocio de Finnlando decidis 17.5.1980 en ĝenerala kunveno rajtigi la asocian estraron havigi por la asocio proprietan ejon en Helsinki. ...**ni ne forgesu, kio estas la soklo de la propra hejmo: tio estas vi, membroj kaj aliaj subtenantoj, kiuj ebligis tiun rezulton.**"

En la sekva numero estis anoncita la adreso de la oficejo, *Pengerkatu 18 A 86*. Ĝi kostis 40 000 markojn, kaj 8 474,46 restis por riparado kaj ekipo. En numero 1/1981: "...en fenestro mi vidas esperantan flageton, apude verdajn kreskaĵojn. Guste elektitaj kurtenoj ŝirmas la internajon... **Jes, EAF ne plu estas senhejma. Certe ja ankaŭ antaŭe ĝi ejon havis, eĉ multajn ejojn, en la koroj de siaj membroj. Tiujn hejmojn nia asocio plu havu, kaj tiuj ejoj estas la plej gravaj, sed bone ja estas ankaŭ materie loĝlokon posedi.**"

Aparte mencienda inter la efektivigintoj de propra oficejo estas *Ahto Linja*, kiu propramane faris el iom mizera ĉambreto elegantan ejon. Dekses jarojn poste li ĝin denove renovigis, mem jam forpasinta: Lia heredaĵo al EAF ebligis ŝanĝi Pengerkatu 18 je pli vasta kaj pli oportuna ejo ĉe la nuna adreso *Siltasaarenkatu 15 C 65*.

Neniu konstruaĵo daŭras en bona stato sen prizorgo kaj riparado. El protokolo de estrarkunveno en aŭgusto:

**Domkompanio Siltasaarenkatu 15**

**La kasisto sciigis pri la altiĝoj de domelspe-**



**zoj: altiĝo je 90 eŭroj en monata pago, kiu estos 337 eŭroj monate ekde julio. La domkompanio planas renovigi la kloaksistemon kaj ankaŭ fari akvotuban renovigon, unue okazos esploro kaj planado. Krome oni renovigos la elektran sistemon. Ĉi-jare jam okazis farbado de la tegmento.**

Aldona elspezo de 90 € monate estas 1 080 € jare. Domelspezoj estas dividitaj inter EAF kaj Esperanto-klubo de Helsinki; la 60% de EAF estas 648 €, la parto de Helsinki do 432 €, alvokanta nin ĉiujn, ne nur Helsinki-anojn subteni. Por kalkulekzerco aŭ ciferludo, la parto de EAF egalas al 29,45 individuaj membrototizoj de 22 €, aŭ 14,73 kotizoj en *Societo Nino Runeberg*. Membro ĝi povas kiu ajn, ankaŭ (dume!) neesperantisto. Membreco povas ankaŭ esti donaco al amiko kiun vi volas interesigi.

Alia kalkulekzemplo: Se unu vendita aĵo, libro aŭ alia, enspezigas 3,50 eŭrojn, ducent vendoj sufiĉas por la sumo. **Plej bona maniero subteni estas uzi servojn, aĉeti, membri.** Lernolibro por donaci al amiko, tiu libro, disko, kiun vi scias, sed ne jam havas mem. **Stoko moviĝu en la oficejo, la oficejo solide restu ĉe ni.**

Tuomo Grundström

# Premioj dum la Universala Kongreso

## Honoraj Membroj

En sia unua kunsido en Rejkjaviko, la 20-an de julio, la Komitato de UEA elektis tri novajn **Honorajn Membrojn de UEA**: *Roland Lindblom* (Svedio, nask. 1931-01-19), *Biruta Rozenfelde* (Latvio, nask. 1933-12-18), *Hallgrímur Sæmundsson* (Islando, nask. 1926-06-19, mortis 2013-06-22)

## Trofeo Fyne

Dum la Solena Fermo de la 98-a Universala Kongreso la 27-an de julio en Rejkjaviko la nova prezidanto *Mark Fettes* transdonis la diplomon pri la Trofeo Fyne al *Nguyen Thi Nep* de la **Vjetnama Esperanto-Asocio** pro ĝia multflanka organiza plifortigo en la lastaj jaroj, pro granda proporcio de gejunuloj inter ĝiaj vicoj, kaj pro la eksterordinare sukcesa organizado de la 97-a UK en Hanojo pasintjare.

La Trofeo aljuĝeblas de la Estraro de UEA al tiu landa asocio, en kies lando okazis la plej granda procenta kresko de la nombro de individuaj membroj de UEA aŭ kiu alimaniere grave kontribuis al la plifortigo de UEA – unuafoje ĝi disdoniĝis en 1975.

## Premio Deguĉi

La **Premio Onisaburo Deguĉi**, ”la esperantista pac-premio”, estis starigita per donaco de Oomoto en 1987, kaj aljuĝita ĉiujare ekde tiam. La Premio konsistas el monsumo de 2 000 eŭroj kaj el diplomo.

Laŭ sia regularo la Premio Deguĉi estas asignata ”pro meritoj en la utiligo de Esperanto kiel rimedo por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la ideo de d-ro Zamenhof kaj al instruoj de *Onisaburo Deguĉi*, kaj pro kontribuo al la celo de UEA kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por aliaj popoloj”.

Per decido de la Estraro de UEA, la Premio Deguĉi de la jaro 2013 estis aljuĝita al la reta projekto **lernu.net**.

La retejo **lernu.net** estis lanĉita en decembro 2002. Ekde tiam amaso da homoj lernis Esperanton per la modernaj retaj rimedoj, kiujn ĝi ofertas. Jam preskaŭ 150 000 homoj ĉie en la mondo registriĝis kiel uzantoj. ”Disvastigante la Internacian Lingvon Esperanto, **lernu.net** plenumas en unika kaj efika maniero la idealojn de la Premio Deguĉi”, diris la Estraro en la pravigo de la decido pri la ĉi-jara laŭreato.

## Elstara Agado

12 esperantistojn la Estraro de UEA honorigis per **Diplomo pri Elstara Agado** aŭ per **Diplomo pri Elstara Arta Agado**:

### Diplomo pri Elstara Agado

*Grietje Buttinger* (Britio) pro gastigado de esperantistoj dum pluraj jardekoj; *Kostas Kiriakos* (Grekio) pro lia ampleksa libro en la greka pri Esperanto, aperinta okaze de la 125-jariĝo de la lingvo; *Zsófia Kóródy* (Germanio) pro instrua agado kadre de ILEI, KER-ekzamenoj kaj la Interkultura Centro Herzberg; *Hans Michael Maitzen* (Aŭstrio) pro reprezentado de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Vieno; *Mélanie Maradan* (Svislando) pro agado ĉe internaciaj terminologiaj instancoj kiel reprezentanto de UEA; *Arikapalli Giridhar Rao* (Hinda Unio) pro multflanka Esperanto-agado en la faka, instrua-ekzamena kaj organiza kampoj; *Roland Rotsaert* (Belgio) pro okupiĝo pri la Esperanto-biblioteko en la flandra urbo Kortrejko kaj *Bardhyl Selimi* (Albanio) pro lia rolo en la plifortigo de la albana Esperanto-movado.

### Diplomo pri Elstara Arta Agado

*Gerrit Berveling* (Nederlando) pro kontribuo al la traduka Esperanto-literaturo; *Jorge Camacho* (Hispanio) pro kontribuo al la originala Esperanto-literaturo; *Georgo Handzlik* (Pollando) pro kontribuo al la Esperanto-muziko kaj eldona agado kaj *Mao Zifu* (Ĉinio) pro kontribuo al la originala Esperanto-poezio.

### Premio Diana Aitai

*Siru Laine* el Finnlando fariĝis la dua ricevanto de la **Premio Diana Aitai**, kiun UEA starigis per donaco de la estona esperantisto *Peeter Aitai* omaĝe al la memoro de lia filino Diana, kiu forpasis nur 22-jara en tragika akcidento. La premio celas rekoni kaj kuraĝigi la plej junan aktivan anon de la Internacia Koruso de UK laŭ la rekomendo

de ĝia dirigento, ĉi-foje *Alan Bishop* el Aŭstralio. Diana Aitai mem estis korusano en la UK-oj de Roterdamo (2008) kaj Bjalistoko (2009).

Siru Laine, kiu studis en Islando, ne nur kantis en la Internacia Koruso, sed ŝi krome estis membro de la Loka Kongresa Komitato kaj helpis kiel interpretisto kaj ĉiĉerono.

## Belartaj Konkursoj 2013

### Poezio:

Unua premio: *Nicola Ruggiero* pro "Okazis iam";  
 Dua premio: *Benoît Philippe* pro "Atenataverno";  
 Triapremio: *Nicola Ruggiero* pro "Nurkorvojdu".  
 Partoprenis 32 verkoj de 17 aŭtoroj el 15 landoj.

### Prozo:

Unua premio: ne aljuĝita;  
 Dua premio: *Ewa Grochowska* pro "Parentezo";  
 Tria premio: *Jesper Jacobsen* pro "La punĉbovlo de la diablo";  
 Honora mencio: *Ewa Grochowska* pro "Eskapo".  
 Partoprenis 24 verkoj de 12 aŭtoroj el 10 landoj.

### Teatraĵo:

Unua kaj dua premioj: ne aljuĝitaj;  
 Tria premio: *Luiza Carol* pro "Tempo rabita";

Honora mencio: *Nikolao Uzunov* pro "Veronia".  
 Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

### Eseo:

Premio "Luigi Minnaja": *Jorge Camacho Córdon* pro "De hajko al hajko" kaj *Lena Karpunina* pro "Aliro al la mistera Jean Ribillard";  
 Dua premio: ne aljuĝita;  
 Tria premio: *Dimitrije Janicic* pro "Cent jaroj de originala Esperanto-literaturo en Serbio".  
 Partoprenis 8 verkoj de 7 aŭtoroj el 5 landoj.

### Infanlibro de la Jaro

*Eldonejo Mondial* pro "La mirinda sorĉisto de Oz" (traduko: *Donald Broadribb*).  
 Partoprenis 1 verko de 1 eldonejo el 1 lando.

## Nova Estraro de UEA

La nova Estraro de UEA decidis pri la laborkampoj de siaj membroj:

*Mark Fettes* (prezidanto) gvidas la subteamon "Mastruma Evoluo": Strategia laborplano, financo, Centra Oficejo, kongresa politiko, TEJO, CED, uea.org;

*Martin Schäffer* (ĝenerala sekretario): Komitato, komunika politiko, Delegita Reto, financo kaj administrado (kunlabore kun Fettes);

*Stefan MacGill* (vicprezidanto) gvidas la subteamon "Movada Evoluo": Kapabla agado (ILEI, edukado.net, aktivula trejnado), Komisionoj pri Oceanio kaj Afriko;

*José Antonio Vergara*, subteamo "Konscii-

go": Tutmonda Inform-Reto (TIR); Faka agado, Terminologia Esperanto-Centro (TEC), IKU; TEJO kaj CED (kunlabore kun Fettes);

*Stefano Keller* gvidas la subteamon "Monda Evoluo": Konsiigo: Komisiono pri Rilatoj kun Internaciaj Organizaĵoj (KRIO), Ĝemelaj urboj;

*Barbara Pietrzak*: Kultura evoluigo (i.a. Akademioj Lingva kaj Literatura, Belartaj Konkursoj), Komisionoj pri Eŭropo kaj Mezoriento/Nord-Afriko;

*Lee Jung-kee*: Kapabligo (kunlabore kun MacGill), Novaj landaj asocioj, Komisiono pri Azia Esperanto-movado, E-Centroj.

## Nova organo de UEA: la Konsilio

En sia lasta kunsido en Rejkjaviko, la 26-an de julio, la Komitato de UEA kreis novan komisionon, kiu ricevis la nomon **Konsilio** kaj kiu proksime kunlaboros kun la nova Estraro pri la efektiviĝo de la Strategia Laborplano de UEA. La Komitato difinis ĝian rolon jene:

La Konsilio enhavos homojn, kiuj povas kontribui al la evoluigo de la ĉefaj agadkampoj de la Asocio: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo, Kunordigo. Ĝi estos gvidata de la Ĝenerala Sekretario de UEA, kadre de la Estrara subteamo pri "mastruma evoluo", kiu inkluzivas la Prezidanton kaj la Vicprezidanton.

La Konsilio ne kunsidos fizike inter la kongresoj, sed ĝi okazigos virtualajn kunsidojn proksimume ĉiun duan monaton. La celo de tiuj kunsidoj estos resumi la progreson, kontroli la laborplanon por la venontaj monatoj kaj trakti eventualajn problemojn aŭ demandojn pri kiuj necesas pli vasta diskuto. La tagordon por tiuj kunsidoj pretigos la Ĝenerala Sekretario konsulte kun la Estraro kaj la Konsilio. La teknikan bazon por la kunsidoj devos ankoraŭ difini la Estraro.

La elekto de Konsilianoj kutime okazos en elektoĵaro, post la elekto de nova Estraro. Konsilianoj oficos dum tri jaroj, krom se ili propravole demisias, aŭ se la Komitato decidas mal-

fondi la Konsilion aŭ okazigi novan elekton. Inter la kongresoj, la Komitato rajtigas la Estraron alekti novajn Konsilianojn laŭbezone.

La Konsilio povas fari rekomendojn al la Estraro kaj Komitato, sed tiuj ĉi restas la solaj decidorganoj de UEA. La celo tamen estas, ke sur la diversaj agadkampoj la koncernaj estraranoj kaj konsilianoj formu koheran teamon, kiu kunpensas kaj kunaktivos en praktika kaj harmonia maniero.

La ekzisto de la Konsilio ne tuŝas la rajton de ĉiuj komitatanoj, aktivuloj, kaj ordinaraj membroj de la Asocio turni sin al la Estraro kun proponoj, demandoj kaj konsiloj.

### **Kiel membroj de la Konsilio estis elektitaj:**

*Petro Baláž* (Slovakio); *István Ertl* (Luksemburgo); *Heidi Goes* (Belgio); "Trezoro" *Huang Yinbao* (Ĉinio); *Zsófia Kóródy* (Germanio); *Michela Lipari* (Italio); *Mélanie Maradan* (Svislando); *Francesco Maurelli* (Britio); *Johannes Mueller* (Germanio); *James Rezende Piton* (Brazilo); *Veronika Poór* (Hungario); *Orlando Raola* (Usono); *Amri Wandel* (Israelo); *Rafael Henrique Zerbetto* (Brazilo).

*Laŭ GK de UEA*

## Nova Estraro de TEJO por la jaroj 2013–2015

La Komitato de TEJO kunsidinta en la 69-a IJK en Nazareto elektis 7-kapan estraron. Sampostene reelektiĝis prezidanto *Lukas Zebrowski*, ĝenerala sekretario *Pawel Fischer-Kotowski* (ambaŭ el Pollando) kaj kasisto *Nico Huurman* (Nederlando). De la antaŭa estraro restis *Michael Boris Mandirola* el Italio kaj *Tina Tišljar* el Kroatio. Novaj en la estraro es-

tas *Veronika Poór* el Hungario kaj *Alexandre Raymond* (Alekcjo) el Francio/Brazilo. La estraron post sesjara laboro forlasis *Sergeo Tyrin* el Israelo (ne rekandidatiĝis) kaj post unu oficperiodo *Petra Smidéliusz* el Hungario/Argentino.

*TEJO*



## Rezolucio de la 98-a Universala Kongreso de Esperanto Esperanto 98. maailmankongressin julkilausuma

Ni, 1034 partoprenantoj en la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 55 landoj de ĉiuj mondopartoj al la plej norda ĉefurbo, Rejkjaviko, sur la insulo Islando,

*Diskutinte* en pluraj sesioj pri la temo ”Insuloj sen izoliĝo: por pli justa komunikado inter lingvo-komunumoj”;

*Konstatas*, ke insuloj – historiaj, geografiaj kaj sociaj – estas originaj fontoj de biologia kaj kultura diverseco, kiujn indas konservi kaj protekti;

*Esprimas* maltrankvilon pri la nuntempe akriĝantaj minacoj al tiu diverseco, pro pluraj homogenigaj kaj detruaj tendencoj de la regantaj ekonomiaj kaj politikaj sistemoj tutmonde;

Samtempe *bonvenigas* la kreskantajn ŝancojn por translima kaj transkultura interkompreniĝo, kiujn donas la disvastiĝo de komunikaj rimedoj kiel Interreto;

*Atentigas* pri la graveco de lingva diverseco kaj lingva justeco en la protektado de tiu kultura bunteco, kiun heredigis al ni la insuloj de la mondo;

*Memorigas*, ke ĝuste tiu protektado de diverseco estas kerna valoro de la movado por la internacia lingvo Esperanto;

*Konfirmas* la volon de la Esperanto-movado kunlabori cele al mondo de ”insuloj sen izoliĝo”, kie ĉiuj lingvoj kaj kulturoj povas kunekzisti kaj plue disflori en reciproka respekto;

*Alvokas* al mond vasta kunlaboro per lingve justaj rimedoj por kontraŭstari la minacojn de klimatsanĝo kaj biokultura homogeniĝo;

*Asertas* la urĝecon de tia agado por konservi la trezorojn de nia insuleca planedo.

Rejkjaviko 27 julio 2013

Me Esperanton 98. maailmankongressiin 55 maasta ja kaikista maanosista Islannin saarivaltion pääkaupunkiin Reykjavikiin kokoontuneet 1034 osanottajaa

*keskusteltuumme* kongressin aiheesta ”Saaret eivät eristä: Reiluun viestintään kieliyhteisöjen välillä”

*toteamme*, että saaret – historialliset, maantieteelliset ja yhteiskunnalliset – ovat biologisen ja kulttuurisen moninaisuuden alkulähteitä, moninaisuuden, jota tulee säilyttää ja suojella,

*ilmaiseimme* huolestumme tähän moninaisuuden kohdistuvista kärjistyvistä uhista, jotka johtuvat globaalisti vaikuttavien taloudellisten ja poliittisten järjestelmien tasapäistävästä ja tuhoavista piirteistä,

samalla *tervehditiem* rajoja ja kulttuurisia rajoitteita ylittäviä mahdollisuuksia keskinäiseen yhteistyömyrkkyeseen, joita uudet verkkovälitteet tarjoavat,

*kiinnitämme huomiota* monikielisuuden ja kielellisen oikeudenmukaisuuden merkitykseen sen kulttuurisen monimuotoisuuden suojelemiseksi, jonka maailman saaret ovat antaneet meille perinnöksi,

*muistutamme*, että juuri tämä moninaisuuden suojeleu kuuluu kansainvälisen esperantoliikkeen ydinarvoihin, vahvistamme esperantoliikkeen tahdon yhteistyöhön sellaisen maailman rakentamiseksi, jonka ”saaret eivät eristä” ja jossa kaikki kielet ja kulttuurit voivat elää ja kukoistaa yhdessä toisiaan kunnioittaen,

*kutsomme* maailmanlaajuisen yhteistyöhön kielellisesti reiluun keinoin ilmastonmuutoksen ja biokulttuurisen latistumisen uhkia vastaan

*kiirehtiem* sen tärkeyttä meidän saarenkaltaisen planeettamme aarteiden suojaamiseksi.

Reykjavik 27.7.2013

## Esperanta feriado en Kroatio

Kroata Esperanto-Centro organizis feriosemajnon sur la insulo *Prvić*, areo de nur 2,37 kvadrataj kilometroj, sed la insula marbordo estas pli ol dek-kilometra. Proksime situas la duoninsulo Primošteno, kie esperantistoj svarmis antaŭ kelkdek jaroj. Prvić atingeblas ŝipe de Šibenik-urbo, naŭdek km norde de *Split*. La tuta insulo estas senaŭta speciala kultura heredaĵo.

Nia dudeko enbusiĝis en Zagrebo. La aŭtostrado ŝajnis libera, rapida, sed baldaŭ ĝin plenigis veturiloj el diversaj landoj. La organizanto disdonis al ni altkvalitajn turismajn broŝurojn kun multegaj belaj fotoj. Amuzis nin lia komento "Niaj vojoj estas bonaj, sed ŝtopiĝas de eksterlandaj turistoj".

Ni trairis longajn tunelojn, eĉ 7-kilometran, transiris altajn pontojn de unu altaĵo al alia. La kamparo ŝajnis alloga, la vidaĵoj belegaj. Bicyklistoj elektu aliajn vojojn, kaj ankaŭ ni devis ŝanĝi la itineron por la revenvojaĝo, ĉar tiam la plej longa ponto estis fermita pro fortega vento. Tre instrua ŝanĝo: ni vidis tute aliajn pejzaĝojn, eroditajn, rostitajn de senkompata suno, ravinojn, akvorezervejojn, kavernojn kaj valojn el griza roko. De sur la deklivoj jam antaŭ sessep jarcentoj i.a. venecianoj senskrupule hakis la arbaron kaŭzante nekuraĉeblan erozion: "Venecio staras sur niaj arboj." La finan streketon de la kontinento al la insuleto ni veturis en du malfermaj motorboatoj. Sur la strandoj vidiĝis ŝtonmuretoj, konstruitaj dum generacioj por malhelpi la moviĝon de tero kaj humo en la maron kaj por marki la limojn inter paŝtejoj kaj posedaĵoj.

De la kajo nur kelkajn paŝojn al nia hostelo



La feriadaj spertoj de problemoj kaj lukso kontribuas al konatigo de Kroatio, nova EU-membro kaj kandidato por organizi Universalan Kongreson.

*Peski*, staranta en la ombro de grandaj verdaj mediteraneaj pinoj, nur kelkajn metrojn de la maro, kie sinbanantoj sunumiĝas. La tuta hostelo je nia dispono. Neniuj ŝlosiloj bezonataj. Balkonoj kaj pordoj malfermaj. Vidaĵoj al la bluega golfeto: ŝipetoj, naĝantoj, ludemaj infanoj; kajakoj kaj bicikloj senpage uzeblaj. En la ĉambroj duetaĝaj litoj, duŝejo, necesejo, tablo, du seĝoj, ŝrankoj. En la manĝejo blankaj tablotukoj kaj punte ornamita antaŭtuketo ĉe la talio de la kelnerino, kiu trifoje tage portas al ĉiuj la manĝaĵojn sur blankaj teleroj. Ofte kolbasetoj, kelkfoje kokidaĵo, porkaĵo, salato, ovaĵo, supo, prunoj, akvomelono, glaciaĵo. Matene kaj dum la tuta posttagmezo kafo kaj infuzaĵo en termosoj.

Ho, ne gravas la manĝaĵoj, sed la pura Adriatika maro. Tamen atentu la marajn erinacojn por ne havi pikilojn en viaj piedoj! Lulas nin la trankvilo, kvieto, susuro de la pinaro, ĉirpado de cikadoj. Kelkvespere ĝenas laŭta muziko de



la alia bordo de la golfeto, kiam ni esperantistoj arigas sur la sofoj kaj foteloj de la teraso. Okazas riĉa koncerto de la kroata operkantisto *Neven Mrzlečki*, prelegoj kun diapozitivoj pri Krasnojarsko, Pollando (Krakovo), kroataj parolturnoj kaj prononco, pri la gazeto Zagreba Esperantisto, pri Primošteno, pri la finna saŭno. De la fenestro de la manĝejo pendas lituko, sur kiun la prelegantoj komputile reflektas siajn tekstojn kaj bildojn. Ni ankaŭ vizitas la Memorcentron de *Faust Vrančić*, kiu en la 16-a jarcento elpensis kvindekda novaj maŝinoj kaj angulan paraŝuton, verkis 5-lingvan vortaron, fariĝis episkopo, diplomato, laŭ sia deziro li estis entombigita en Prvić.

Ni vizitas tri naciajn parkojn. La unua, la insularo *Kornati*, kovras 25,2 km<sup>2</sup>, enhavas 109 insulojn, el kiuj 76 areas po malpli ol unu hektaron. Ili elstaras el la blua senonda akvo kiel grizaj rondaj kalvaj kranioj, neloĝataj, eroditaj. La plej forajn ronĝadis la maro dum ŝtormoj, ŝetante siajn ondegojn sur kaj trans ilin. Videblas grotoj kaj kavaĵoj. Scivolemuloj el inter ni plonĝas en la akvon kun sia spirtubo. Poste ili rakontas, ke ili vidis koralojn, mar-anemonojn kaj fiŝojn. Aliaj rondnaĝas en la bluega maro nur por amuzi sin. La kapitano havas tempon atendi. Aliaj turistoj ne videblas.

La nacia parko *Krka*, 109 km<sup>2</sup>, sur rivero Krka konsistas el kanjono, akvofaloj, insuletoj, lagoj, rokoj. La akvofalojn, kaskadojn kaj lagojn estigas kaj daŭre ŝanĝas travertino, t.e. sedimenta kalkpetro kontakte kun vegetaĵoj.

Tiu ĉi grava ornitologia ejo enhavas riĉan flaŭron kaj faŭnon. Aldone troveblas spuroj de pratempaj kulturoj, ruinoj, preĝejoj, monaĥejo, fortikaĵoj, akvomuelejoj. Se oni havas tempon, indas konatiĝi piede kaj ŝipe. Niaj kelkaj horoj neniel sufiĉis por tio.

*Plitvice*, alia nacia parko el lagoj kaj akvofaloj, kovras preskaŭ 300 km<sup>2</sup>. Abundas tie plantospecoj (pli ol 1 200, el kiuj 75 estas endemiaj), tie vivas papilioj, vespertoj, karnomanguloj, ursoj. Tamen oni devus zorgeme plani sian viziton, ĉar la svarmo de la sennombraj vizitantoj malfaciligas la konatiĝon. Ĉie oni devas viciĝi, atendi, atente rigardi siajn piedojn kaj piedfingrojn por ne stumbli aŭ kolizii kun aliaj vizitantoj.

La urbon *Šibenik* (pli ol 37 mil loĝantoj) ni vizitis negrupe. Ĝi havas longan historion, kie rolas i.a. venecianoj kaj aliaj italoj, francoj (Napoleono), Aŭstria Imperio, Patrolanda Milito (post la disiĝo de Jugoslavio). Kiom multe batalis kaj suferis la popolo, oni povas nur imagi kaj miri. La malnovan kvartalon karakterizas labirinta ŝtuparo sur kruta deklivo. Je ĉiu paŝo la piediranto malkovras interesajn detalojn de arkitekturo kaj spurojn de la pasintaĵoj tra la jarcentoj. La nuno kaj pasinteco intermiksiĝas.

Kroatio ĝoje membriĝis en EU en julio 2013. Tamen malmulte ni scias pri ĝi, la informoj en niaj enciklopedioj kaj eĉ en la reto ne ĉiam validas. Esperantistoj povas iom helpi en la disvastigo de sciigoj kaj travivaĵoj. Kuraĝe partoprenu!

*Saliko*

## Eventokalendaro – Tulevia tapahtumia

### 2013

15.12. Zamenhof-festo

### 2014

8.–9.3. Vintraj Tagoj en *Turku*

28.6.–4.7. BET en *Jelgava*, Latvio

12.7.–20.7. SES-2014 okazos en *Nitra*,

Slovakio

14.–18.7. Somera kurso en *Orivesi*

26.7.–2.8. UK en Bonaero (Buenos Aires), Argentino

en septembro: Aŭtunaj Tagoj en *Iisalmi*

### 2015

en marto: Vintraj Tagoj en *Tampere*

25.7.–1.8. la 100-a UK en Lillo (Lille), Francio


## Rejkjaviko – malgranda kaj intima Esperanto-kongreso

Islando, la plej malgranda lando (eĉ se kalkuli la liberan urbon Dancigo en 1927), kiu gastigis la universalan kongreson, faris tion ĉi-jare la duan fojon dum la plej lasta semajno de julio. La kongreso estis malpli granda ol en 1977, sed ne multe kaj la nova kongresejo *Harpa* montriĝis tute taŭga por malgranda kongreso. Eĉ en la granda salono ne troviĝis multe da malplenaj lokoj kaj ĝi donis la impreson, ke la salono estas grandparte plena. Foje la malgrandaj salonoj estis eĉ tro malgrandaj.

Centra loko en la kongresejo estis la kafejo de Harpa, kie la prezoj estis ne aparte altaj, almenaŭ ne por finnoj. Ankaŭ la onidira multekosteco de la lando ne multe efikis al la aŭkcio, kiu donis gajnon da 1 589 eŭroj, proksimume similan kvanton kiel la pli granda UK en Kopenhago antaŭ du jaroj. La aŭkcio funkciis per eŭroj, kaj en eŭroj estis ankaŭ prezoj en la libroservo, sed tamen la konstanta mono akceptata estis nur islandaj kronoj.

Dum la kongreso estis elektita nova prezidanto kaj estraro de UEA. Kongresanoj ligas grandajn esperojn al la nova prezidanto *Mark Fettes* kaj la estraro pri reformoj. La nova estraro planas labori iom alistile, ne dividante taskojn al unuopaj estraranoj, sed dividante subteamojn cirkaŭ plej gravaj taskoj. Granda parto el la estraranoj estas fakte (aŭ iam estis) profesiaj esperantistoj, ĉu bona aŭ malbona eco? Almenaŭ stile la novismoj jam komenciĝis, ĉar sian ferman paroladon la nova prezidanto faris libere, sen notoj, moviĝante sur la podio.

En la nacia vespero temis grandparte pri vikingaj tradicioj. Unu el la plej interesaj eroj estis la islanda nacia luktoarto *glima*, kio similis foje dancadon, foje luktadon. Restis neklare, kiu el la luktantoj gajnis. En la programo estis ankaŭ popolmuziko kun balkana etoso fare de grupo da junaj muzikistoj. Krome la plurtalentecon de islandanoj montris ankaŭ la anoncisto de la vespero (samtempe vicprezidanto de LKK), kiu dum la



Päivi kaj Harpa. Foto: RB.

vespero fojfoje aliĝis al la (islanda) koruso, kiu prezentis islandajn kantojn. La malgrandeco de la lando certe igas kontaktojn kun lokaj gravuloj pli facilaj, kaj ne estis aparta surprizo vidi la prezidanton de Islando parolante dum la inaŭguro. La malgrandeco de la lando, urbo kaj urbocentro, videbligis esperantistojn vaste, kaj iuj restoracioj havis ankaŭ esperantan menukarton.

La internacia kongresa universitato inkluzivis ĉi jare prelegserion pri violono, fare de la finnfranca *Hannes Larsson*, kun pluraj sonekzemploj. En esperantologia konferenco ni aŭdis eĉ prelegon en la dana (kun esperanta traduko de *Christer Kiselman*) fare de islanda neesperantisto, *Guðrún Kvaran*, pri islanda lingvopolitiko, kiu resistas firme, kaj sukcese, kontraŭ internaciaj fremdvortoj, kiuj svarmas al aliaj lingvoj.

Se io mankis el la kongresa programo, eventuale estis prelego pri la ekonomia krizo en Islando, sed kion fari, se la lokaj esperantistoj preferis prelegi pri temoj pli foraj en la historio. Eble unu el la sekvoj de la krizo estis ke la regalado dum la urbestra akcepto estis la plej magra dum la pasinta jardeko, nur glaso da vino kaj iomete da manĝetoj.

Necesis preskaŭ duono el la kongreso por aranĝi la kongreson, tiel aspektis dum la fermo, kiam ankaŭ helpantoj, mem kongresanoj, estis vokitaj al la podio por dankoj. Kongresanoj helpis diversmaniere, i.a. interpretante dum la ekskursoj. La aranĝoj ĝenerale bone funkciis kaj same ankaŭ la teknikaĵoj.

*Jukka Pietiläinen*

## Persone pri biografioj de Zamenhof

Estis eta surprizo, ke mi trovis en la hejma libro sepe diverslingvajn biografiojn de d-ro L. L. Zamenhof. Avide mi komencis ilin foliumi kaj fragmente ripetlegi. "Vivo de Zamenhof" de *Edmond Privat* estas klasikajo, kiu aperis en 1920. Mi havas la trian eldonon aĉetitan 1960 en iu librobokantejo. Tiam mi estis tute freŝbakita komencanto, kiu en la antaŭa jaro ekstudis la lingvon. La fascina stilo tuj kaptis mian atenton. Profundan plezuron vekis la elegantaj, simple belegaj kaj sentemaj esprimoj en la teksto. Korstuŝe mi studis substrekitaĵojn vortojn kaj frazojn antaŭ 50 jaroj notitajn. Nostalgio konkeris kaj ekregis mian animon. Spirdetene estis necese halti por cerbumi kaj digesti iujn poeziajn erojn. Neforgesebla estas la komenco: "Litvo! Patrujo mia! simila al sano, Vian grandan valoron ekkonas litvano Vin perdinte." Egala tono finas la verkon: "Nun, tiu skriboĉambro lia, ĉe domo varsovia, estas malplena. Pie ĝin konservis netuŝitan la nobla vidvino. Kiom vastega la manko. Kiom doloriga... Tie li sidadis. Tie liaj libroj. Tie la iloj okulistaj. Tie la paĝo nefinita. Silentas la horloĝo." Haltu, senhezite vi mem legu pri la vivofazoj de Ludoviko Zamenhof en la akompano de *Edmond Privat*. Indas parenteze aludi ankaŭ al la anglalingva versio de *Ralph Elliott* el la jaro 1963.

Por la 44-a UK en Varsovio *Maria Ziolkowska* verkis en la pola lingvo la libron "Doktor Esperanto", kiu enhavas paralelan trafan tradukon de *Isaj Dratwer* en Esperanto. Donace al mi enmanigis en la inspiran libron en la jaro 1968 *Andrzej Petyń*. Tiutempe mi neniel rimarkis la polingvan tekston. Kelkajn jardekojn poste kiel 75-jarulo mi komencis ekstudi la polan lingvon en vespera lernejo. Subita lumo ekestis en mia kapo kaj mi komprenis la valoron de la paralelaj tekstoj en "Doktor Esperanto". Laŭvorta kaj plene identa traduko estis sukcesa gvidilo en la sekretojn de la slava, al mi nekonata lingvo.

Neniel mi regas la polan lingvon, sed daŭre mi iam kaj tiam legadas kaj analizas la tekston de tiu bonega fonto dum la lingvostudado. Iomete malfermiĝis al mi la pensmaniero en la slava lingvofamilio. Tia hobiado tenas la pensaparaton moviĝema.

Poste sekvis la *Marjorie Boulton* – ĝemeloj, en la angla (1960) ĉe *Routledge & Kegan Paul* en Londono kaj en E-o (1962) ĉe Stafeto en *La Laguna*. Tre reputaciaj kaj altiraj estas ambaŭ kreaĵoj, kvankam ne tute identaj. Ofte mi enmanigas ilin kaj kelkajn ĉapitrojn relegas. En septembro 1994 mi vizitis Oksfordon kaj pasigis unu horon en la hejmo de Marjorie Boulton. Ŝi kolore rakontis pri sia verkista laboro kaj omaĝis per sia subskribo sur la titolpaĝo de mia ekzemplero de "Zamenhof – Creator of Esperanto". Sendube tiaj spertoj estas neforgeseblaj, kvankam en mia animo ioman embarson kaŭzis ŝiaj imponaj katoj. Ankaŭ etaj sperteroj povas entuziasmigi – almenaŭ min – al daŭra kaj ripetata legado.

Fine ni lasu novajn freŝajn ventojn blovi. Estas tempo por transiri al dunaskitoj, sed ne identaj, de *Aleksander Korjenkov*: "Homarano" (2011) kaj "The Life of Zamenhof" (2010) tradukita de *Ian M. Richmond*. Nia talenta verkisto kaj ĵurnalisto Aleksandro el Kaliningrado elplumigis profunde riĉan monografion, por ordinara leganto ĝi estas fonto neelĉerpebla, vera oceano informa. Prof. *Tonkin* enkondukis la anglalingvan version kun novaj ideoj kaj trafaj argumentoj al la nova generacio. Kun la supraj literaturaj perloj mi bonfartas. En soleca hejmo mi neniel sentas min lasita kaj izolita. Silente mi dialogas kun movadanoj pasintaj kaj nunaj. Al ĉiuj legemuloj mi forte rekomendas la menciitajn voĵmontrilojn.

*Jorma Ahomäki*  
en julio 2013

# ”Esperanto – taŭga ilo por sociaj luktantoj”

Fotoj: Robert Bogenschneider

Jen la temo de la 86-a SAT-kongreso, kiun SATEH (la hispanlingva branĉo de SAT) sukcesis organizi en la hispana ĉefurbo Madrido. Ĉirkaŭ 100 partoprenintoj kunvenis de la 28-a junio ĝis la 4-a aŭgusto en konvena universitatkvartala ”Colegio Mayor Chaminade”, post subita devo trovi alternativan kongresejon. Des pli mi dankas kaj gratulas al la OKK, precipe *Pedro Sanz*, *Jose Maria Salguero (Kani)* kaj *Miguel Fernández*, sed ankaŭ la reston de la teamo.

De Kani gvidataj promenoj tra la urbo konatigis nin kaj kun la pasinta historio (Franco kaj la interna milito kun bataloj ankaŭ en Madrido mem), kaj kun lokoj de aktualaj okazaĵoj kiel la manifestacioj de la ”indignuloj” (Movado 15M).

Imprese estis kontaktoj kun eksteresperantistaj instancoj: ni estis akceptitaj en la sindikato CNT; okazis podiaj diskutoj (en la hispana, kun heroa sinsekva traduko al kaj el Esperanto fare de *Jorge Camacho*) kun la feministino *Prado Esteban*, ĵurnalistoj de la tradukreto ”Tlaxcala”, la universitatnivela gazeto ”Germinal” aŭ la anarkiisma ”Tierra y Libertad”,



Grupfoto.

kiu uzas Esperanton en sia kolofono kaj reĝisorino de la mallonga filmo ”CiudadanosDelMundo” pri la mistrakto de senhejmuloj kaj fremdaspektantoj, en kiu rolis ankaŭ OKK-ano *Pedro Sanz*. Eĉ okazis surpriza vizito de la koruso ”Solfónica”, kiu kutime kantas surstrate por la ”Indignuloj” de la movado ”15M”.

Ekskurso al la mezepoka (inkvizicia) urbo Toledo kun vizito de ties juda kvartalo kaj muzeoj: visigota, sefarda kaj de la fama pentristo ”El Greco” kun ties agrabla ĝardeno por ripozi de la eĉ pli alta varmo ol en la somera Madrido.

Prelegoj kiel ”Lastatempaj sociaj movadoj en Usono” de *Brandon Sowers*, ”Solidara sociala ekonomio”



Ŝata renkontiĝejo, la monumento de Cervantes, Don Quijote kaj Sancho Panza.



Alkazaro de Toledo.

de *Félix Jiménez Lobo* kaj "Komunikado kun eksterteranoj" (*Manuel Pancorbo*) klerigis iom pli longe, dum ne rajtis manki du peĉakuĉaj sesioj (tie prezentoj daŭras nur 20x20 sekundojn, kun tre variaj temoj).

*JoMo* dancigis per duonvespera koncerto, dum la lastvespera "Vivu la teatro!" ebligis al deko da artistoj esprimi sin.

Krom abunda libroservo donaca ekzemplerego de "Don Quijote" pezigis la valizon.

*Franjo Leveque* kaj teamanoj invitis al la sekva SAT-kongreso, kiu okazos de la 9-a ĝis 16-a aŭgusto 2014 en la bretona urbo Dinano, nordokcidenta Francio.

Du rezultoj de la kongreso estas la 363-paĝa libro de Miguel Fernández "Poezio: armilo ŝargita per futuro" kun kolekto de engaĝitaj poemoj, kaj prezentado de la longe prokrastita DVD



Radiointervjuo kun juna ĵurnalistino, perata de Kani.  
Foto: Paulo Branco.

"Esperanto" de *D. Gautier*, kun subtekstoj en dudeko kaj dublado en manpleno da lingvoj.

En la retejo <http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html> relegeblas la programo, kaj eblas esplori filmojn, fotojn kaj aldonajn artikolojn – frandu la abundan materialon, kaj eble ĝis revido venontjare en Francio...

RB

## Esperanto? Eldiroj de eminentaj polaj intelektuloj

Velksezo regas mian skribemon. Verŝajne parte kulpas mia naskiĝojaro, kiun mi ankoraŭ bone memoras. Tamen mirakloj iam kaj tiam okazas. Kanadano *Bruce Crisp* puŝis freŝan sangon en miajn vejnojn dum la pasintvendreda intervjuo (23.8.2013) en Pola Retradio en Esperanto realigita de *Barbara Pietrzak* jam pli frue en Rejkjaviko. Trafe *Bruce* analizis elsendojn el Varsovio kaj transdonis siajn privatajn opiniojn pri la programagado. Tio certe kuraĝigis la redakcianojn, kiuj efike kaj bele subtenas nin aŭskultantojn. Grava estis la elsendo kaj brila la intervjuo.

Tuj poste mi trovis en mia hejma biblioteko la verkon "Esperanto? Eldiroj de eminentaj polaj intelektuloj." La libron redaktis *Walerian Włodarczyk* kaj ĝi aperis en la jaro 1964. La tekstoj estas skribitaj paralele pole kaj en Esperanto. Estis grave halti ĉe la opinioj de prof.

*Janusz Groszowski*, kiu siatempe estis la prezidanto de la Pola Akademio de Sciencoj kaj krome longdaŭra aktiva esperantisto.

Espereble *Bruce Crisp* kiel biblioteka fakulo facile ie trovos tiun-ĉi malnovan libron, sed en-have mirinde freŝan en sia labormedio.

Esperantistoj en Tampere povas prunti la verkon en la kluba biblioteko. Indas konatiĝi kun la juvelo el la sesdekaj jaroj. Ne eblas al mi kaŝi mian dankemon kaj entuziasmon pro la altiraĵ elsendoj de **Pola Retradio en Esperanto**. Krome gratulon meritas nia konata finna dermatologo *Synnöve Mynttinen* pro efika kaj grava subteno al la Pola Retradio en la naskiĝurbo de Esperanto. Ek al la aŭskultado kaj raportado!

Amike

*Jorma Ahomäki en Piispanristi.*



## 49-a BET en Utena, Litovio

Fotoj: Robert Bogenschneider

Pli ol 210 partoprenintoj spertis la vican 49-an BET (Baltiaj Esperanto-Tagoj), kiu okazis inter la 6-a kaj 14-a julio en kolegio situanta rekte ĉe la urboplaco de la urbeto *Utena*, nordoriente de Litovio.

La urbo, reprezentita dum la malfermo pere de la urbestro *Alyudas Katinas* kaj en la restoracio "Abu" pere de la vicurbestro *Vidmantas Valinčius*, tre subtenis la aranĝon per mono, taŭgaj ejoj kaj regalo por sesdeko da partopre-

nantoj, je la granda ĝojo de la ĉeforganizanto *Povilas Jegorovas*, kiu naskiĝis nur dek kilometrojn de Utena.

Ĉiuvesperaj koncertoj – ĉu en la muziklernejo, kulturcentro aŭ subĉiele ĉe la apuda lago *Dauniškis* kun alloga vespera iluminado – donis impresojn pri la folkloro en danco (kun dekoj da ĉiugeneraciaj artistoj), kanto kaj muziko.

Ankaŭ la esperantaj instancoj *Asorti*, *Solotro-nik*, *Mikaelo Bronštejn*, *Mihail Povorin*, *Nataša Bertse* kaj *Manŭel* kontribuis per siaj eroj al la abunda programo.

Grandan parton de BET konsistigas krom la diversnivela lingvokursoj la somera universitato kun kelkaj prelegcirkloj kaj unuopaj prelegoj: *Petras Čelaiskas* pri la litova lingvo kaj historio, *Ed Robertson* pri lingvistiko kaj la sendependeco de Skotlando (invitante al la skota kaj unua tutkelta kongreso), *Aleksander Korjenkov* pri la historio de Esperanto kaj Sezonoj, *Dima Ševĉenko* pri la 20-jariĝo de la eldonejo "Impeto" kaj retaj komunumoj kiel



A. Korjenkov prelegas.



Grupfoto antaŭ la muziklernejo.



esperanto.com. *Stano Marček* prezentis sonlibrojn, fungojn kaj krucvortenigmojn, *Grażina Opulskienė* konatigis la litovan ĵurnaliston kaj aventuriston *Pulgis Andriušis* – certe por ĉiu troviĝis io por plukleriĝi.

La taga ekskurso enhavis diversajn erojn: ni vizitis lernejon kaj metiejon por ceramikaĵojn, gvidata de multe premiita potistomajstro *Vytautas Valiušis*, ni vidis pli ol miljaran kverkon; ĉaskastelon en *Rokiškis* kun apuda ekspozicio de tre eksterordinara lignoskulptisto *Lionginas Šepka*. Muelejo kun unu de la restantaj ankoraŭ laborantaj muelistoj regalis nin per naturaj krespoj, kaj boatekskurso al insulo kun ĝuo de fiŝsupo finis la longan tagon.

Plia vidindaĵo de Utena estas la bierfarejo

*Utenos*, kun gvidado tra la moderna fabriko, kiu produktas ne nur sub propraj markonomoj, sed ankaŭ 5 aliajn specojn – inter alie ĝi produktas kaj distribuas *Carlsberg* en baltajn landojn. La aŭtomata stokejo tre impresis min.

TEĴA, la ĵurnalista fakasocio, utiligis apudan drinkejon por teknika kunsido, kaj preskaŭ ĉiutage *Vytautas Šilas* aperigis la bultenon ”Heroldo de Utena”, kiu estas retrovebla en la retejo [www.esperanto.lt](http://www.esperanto.lt).

La sekva, jubilea (50-a) BET okazos inter la 28-a de junio kaj 4-a de julio (restos tri semajnoj ĝis la UK en Argentino) en *Jelgava*, Latvio – proksime al Rigo.

RB



Kolegio.



Kastelo en Rokiškis.



Folkloro ensemblo.



Vizito en la bierfarejo ”Utenos”.

## Bela semajfino en la arkipelago

Fotoj: Tiina Oittinen



Surŝipe dum la ekskurso al Vikinga vilaĝo.

Pli ol 30 partoprenintoj sekvis al inviton de la Esperantoklubo de Salo al la Aŭtunaj Tagoj 2013 en *Kasnäs*.

En bela sunbrilo ni ĝuis la laŭteman insularan naturon kaj vivon per promeno (aŭ grimpo) de geologia pado (kiu montras geologiajn fenomenojn el diversaj tempoj), spektado de filmo pri la insulara faŭno en la naturcentro *Sinisimpukka/Blåmuslan*, kaj busa/prama veturo al la Vikinga centro *Rosala*, kie atendis nin bongusta fiŝsupo kaj kuko. Vizito en arĝenta ateliero

(antaŭa fabriko, en kiu de 17 orajistoj restas nur du), ebleco uzi la hotelan naĝejon kaj vizito en la bieno de *Söderlångvik* kun hejmmuzeo de la mecenato kaj klerulo *Amos Anderson* klerigis kaj refreŝigis menson kaj korpon.

*Tuomo Grundström* improvizis pri la multeco de *linguae francae* – komune uzitaj internaciaj lingvoj. Ĉeestantoj inter la ekzamenintoj ricevis siajn KER-diplomojn, libroservo ofertis varojn (inter ili la nove aperintan tason kun Esperantoflago).

Dankon kaj bonvenon al *Turku*, kie la sekvaj Vintraj Tagoj okazos (vidu la dorsan paĝon).



Tri el la ĉi-jaraj KER-ekzamenintoj ricevis siajn diplomojn dum AT en *Kasnäs*. De maldekstre *Carola Antskog*, *Tuomo Grundström* kaj *Sylvia Hämäläinen*. La diplomojn disdonis la ĉi-foja loka organizanto *Paula Niinikorpi* (dekstre).

RB



En *Söderlångvik*.

## Prelego realiĝis en Mariehamn

En la civitana instituto en Mariehamn realiĝis prelego de Anna Ritamäki-Sjöstrand la 5-an de marto 2013.

Partoprenis 7 personoj el kiuj unu antaŭe partoprenis esperantokursojn kaj unu kiu de konato aŭdis pri pozitivaj esperantospartoj. Tiu kvanto ne donis sufiĉan bazon por anonci

ĉiusemajnan kurson por la aŭtuno.

Estis vasta atento en gazetoj kaj radio lige al la Aŭtunaj Tagoj 2012, sed ŝajnas ke esperanto estas ĝenerale tre nekonata en Alando.

*Anna Ritamäki-Sjöstrand*

## Föreläsning om esperanto i Mariehamn

Medborgarinstitut i Mariehamn erbjöd följande föreläsning i sin värkatalog. Den förverkligades med 7 deltagare.

3080 ESPERANTO -

VÄRLDENS LÄTTASTE SPRÅK?


tisdag 18:15-20:45, 5.3.2013 (1 tillf. 3 lekt.)

Medis, Anna Ritamäki-Sjöstrand, kursavgift 13,80 e

Vi testar om esperanto är världens lättaste språk genom att bekanta oss med ordbildning, grammatik, historia och kultur. Kan något som för drygt 125 år sedan bara fanns i en ung mans huvud och i några tunna häften alls räknas som ett språk? I vilket fall som helst finns det runt om i världen människor som kommunicerar på esperanto. Vi bläddrar i ordboken Plena Ilustrita Vortaro, lyssnar på en låt av Dolchamar, går in på kursportalen [www.lernu.net](http://www.lernu.net) och lär oss några meningar. Inga förkunskaper krävs, men att kunna skillnaden mellan adjektiv och verb ger en fördel.

Anna Ritamäki-Sjöstrand har redigerat scouternas esperantotidning La Skolta Mondo och lett Esperantoförbundet i Finland.

Intresset var inte tillräckligt stort för att Medis skulle ha grund att prioritera en längre kurs i esperanto under höstterminen, så en sådan kurs blir inte av. Däremot kan esperantokurser vid behov arrangeras som studiecirkel.



Preleganonco en la biblioteko. Affischer påminde om föreläsningen

*Anna Ritamäki-Sjöstrand*

### Estis du amikoj

Estis du amikoj. Unu estis granda mensoganto, la alia kredis (almenaŭ ŝajnis tion). Foje la mensogulo diris: "Hodiaŭ mi vidis, ke bovino grimpis sur arbon." La kredemulo respondis: "Ja ĝi ungojn havas." La alia: "Ĉu vi vere estas tiel stulta, ke vi kredas tiaĵon!?" La simplulo pripensis, respondis: "Ja ne estus eble. Branĉoj rompiĝus sub la peza bovino."

### Svedo, norvego kaj finno

Svedo, norvego kaj finno vetis pri tio, kiu el ili plej longe eltenas resti en kaprejo - kapro, kiel ni scias, ja odoraĉegas. Unue estis vico de la svedo. Post minuto li elkuris kun naztruoj kovritaj. La norvego eltenis du minutojn. Laste la finno eniris la stalon. Pasis minuto, du, tri. Post kvin minutoj elkuris - la kapro.

## Esperanto-kurso en Orivesi

La somera Esperanto-kurso en Finnlando estis ĉi-jare julie aranĝita en Orivesi en Orivesi-instituto (Oriveden Opisto). Por la kurso kunlaboris Esperanto-Ligo de Finnlandaj Intruistoj ELFI, la landa asocio Esperanto-Asocio de Finnlando kaj la loka societo, Esperanto-societo Antaŭen el Tampere. La aranĝon partoprenis 13 kursanoj, kursestro kaj instruisto. La instruisto estis Dalia Pileckienė el Litovio kaj unu partoprenanto venis el Svedio.

En la programo estis variaj lecionoj kaj prelegoj de Dalia pri La litova lingvo kaj Kiel ma-

strumi sian tempon. Jukka prezentis al ni gravajn personojn en la finna Esperanto-movada historio. Ni kune kantis kaj ludis lernigajn ludojn. Vespermanĝetojn nia grupo inter si agrable manĝis en ”propra” ĉambro.

La ekskursoj direktiĝis al proksimaj lokoj, la preĝejo kaj la hejmgregiona muzeo. Ambaŭ lokojn prezentis al ni lokanoj.

Venontan someron okazos la dua Orivesi-kurso en 14.–18.7.2014.

*Sylvia Hämäläinen, kursestro*

## Ĉu indis veni al Orivesi?

Ĉi-jare unu semajnon meze de julio mi pasigis ne ie en la plaĝo sunbruligante, tamen en sufiĉe ”freŝvetera” lando, kies helaj juliaj noktoj permesas promeni sen iu-ajn lumigilo... Oni povas diveni, ke temas pri Finnlando. Mi havis aliajn eblojn pasigi mezon de julio, en pli varmaj ĉirkaŭaĵoj, tamen ial mi akceptis inviton de *Sylvia Hämäläinen* gvidi E-kurson en *Orivesi*. Kaj mi ne eraris pro tia elekto. Temas ne nur pri miaj spertoj, kiel tiuj de instruistino, sed ĉefe pri diversnivela vivsperto, kiuj inkludas renkontiĝon kun malnovaj amikinoj *Katriina* kaj *Sirpa*, kun *Asta* kaj *Leena* kaj konatiĝon



Sylvia kaj Dalia. Foto: Sirpa Honkanen

kun multaj bonhumoraj gesamideanoj. Mi estis kortuŝita de la afabla akcepto en familioj de *Hämäläinen* kaj de *Laaksonen*, ĝis nun mi sentas guston de la ”nigra” kolbaso kaj freŝkuiritaj ”munki’oj”, amikecajn ”ondojn”, kiujn mi spertis en la floranta medio de *Katriina*...

Mi devas konfesi, ke gvidi E-lingvan kurson en grupo, kies lingva nivelo tre malsamas, estis forta defio por mi. Dum la unuaj tagoj de la instru-semajno ni kun Sylvia multe diskutis kiel aranĝi la instruadon: ĉu dividi la grupon en apartajn klasĉambrojn, ĉu apartigi kelkajn kursanojn por duon-tago, ĉu?... ĉu?... Finfine ni havis etan grupeton, kun kiu laboris Sylvia en la komuna klasĉambro, kie penadis ĉiuj. Mi konsentas, ke iujn personojn tia ”aranĝo” de la instru-procedo ne kontentigis, ili rajtis grumbleti. Sed, se eĉ damaĝinte bezonojn de la menciitaj grupanoj, ni sukcesis teni komunan etoson dum la tuta semajno. Mi opinias tiel, se vi malkonsentas, diskutu, esprimu viajn spertojn kaj proponojn, ili estos utilaj kaj por ontaj instruistoj, kaj por organizantoj de similaj aranĝoj...

Malgraŭ ĉio mi estas tre dankema al ĉiuj partoprenintoj de la kurso pro ilia toleremo, amikeco, obeemo kaj diligenteo labori ne nur en

la klaso, sed ankaŭ poste, dum malfruaj vesperoj (aŭ fruaj matenoj?) en la ĉambroj, ple-numante hejmtaskojn... Finante mi alparolas al ĉiuj finnlandaj gesamideanoj: Karaj, estimu kaj gardu (kaj profitu) la organizan talenton de Sylvia Hämäläinen, kiu kunhelpe de tampereaj ”nestanoj” kaj *Tiina Oittinen* kreis riĉenhavan

semajnon en Orivesi, plenan ne nur de tedaj E-gramatikaĵoj, sed ankaŭ de ekskursoj, de komuna ludado, kantado kaj muzikado.

*Amike kaj salute al ĉiuj,  
Dalia Pileckienė  
(instruisto de la kurso en Orivesi).*

## Somera Esperanto-kurso en Orivesi 8.–12.7.2013

En julia lunda mateno 15 esperantistoj alvenis al la *Orivesi*-Instituto, kie ni unue partoprenis en la malfermo de ĉiuj kursoj en la granda *Klemetti*-halo kaj povis iom informi aliajn pri Esperanto.

Nia litovia instruistino Dalia kapablis krei agrablan etoson, kiam ŝi instigis nin, donis pozitivan retroagon kaj ĉiam klarigis detale, se ni havis demandojn. Multajn tagojn poste mi aŭdis ŝian alparolon ”Miaj karaj” en miaj oreloj. Mi ĝojas, ke ŝi promesis instrui en Orivesi ankaŭ venontjare!

Ĉiutage estis sur la tabulo nova proverbo, ligita kun temoj de la instruo. Ni ripetis gramatikon kun interesaj, defiantaj ekzercoj, sed ankaŭ parolis – kaj kantis. Ni estis bonŝancaj havi muzikistojn Sylvian kaj Tiinan, kiuj akompanis nin. Unutage Raimo alportis sian fluton kaj ni povis ĝui lian ludon.

Niaj ekskursoj estis tre interesaj por mi, kiu

ne konas la urbeton Orivesi. Marde ni promenis al la hejmgregiona muzeo *Paltanmäki*, kie ni aŭdis pri la konstruaĵoj kun malnovaj mebloj kaj iloj. I.a. mi memoras sur la muro bildon pri la delegitaro, kiu alportis la apelacion de finnoj al la rusa imperiestro en la komenco de la 1900-aj jaroj.

En la korto kaj ĉirkaŭ la muelilo ni jam trovis kelkajn maturajn mirtelojn. Merkrede ni iris al la preĝejo de Orivesi, tre luma kaj vasta, kun impresa altara bildo de *Kain Tapper*. Kun la akompano de Sylvia ni kantis tie ”Florados nun la tero”.

Aldone al la lecionoj ni havis ankaŭ alian programon en la instituto: Dalia prelegis pri la litova lingvo kaj kiel mastrumi sian tempon. Vespere Sylvia aranĝis lernigajn ludojn kaj legis vesperan fabelon. Terhi instruis nin cerban gimnastikon kaj en du vesperoj ni havis eblecon gimnasti kun bastonoj kun lernantoj de aliaj kursoj sur la herbejo en bela vetero. Jukka rakontis kiel li esperantistiĝis, pri gravaj finnaj esperantistoj kaj Tiina kun Tapani informis nin pri Esperanto en reto.

Por mi la kurso ne estis nur tre utila, sed ankaŭ unu el la kulminoj de la tuta somero. La kunlernantoj estis simpatiaj, sed se mi estus povinta deziri ion, plimulte da eksterlandaj partoprenantoj estus estintaj bonvenaj.

Mi kore dankas Dalian, Sylvian kaj aliajn tampereanojn kiel ankaŭ Tiinan pro agrabla kurso. Eĉ la vetero estis somere bela.

*Leena Lindqvist, kursano en Orivesi 2013*



Grupfoto: Sirpa Honkanen



## La 46-a konferenco de ILEI

La ĉi-jara konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI okazis julie en la malgranda vilaĝo *Sieber* en la urbo *Herzberg am Harz* en Germanio. La vilaĝo estis tiel malgranda, ke tie eĉ ne ekzistis butikoj, ne parolate pri banko aŭ bankaŭtomato. La preĝejo staris meze de la vilaĝo kaj feliĉe buso trafikis labortage antaŭ- kaj posttagmeze al Herzberg. Por loĝi ekzistis du hoteletoj kaj familiaj ĉambroj, kaj manĝi oni povis en la hotela restoracio kaj en kelkaj kafejoj. Unu strato kaj la river(et) o Sieber trairis la vilaĝon kaj la domoj staris inter tiuj du, strato kaj rivero. Ĉio tio kuŝis profunde inter krutaj arbarkovritaj montoj. Ĉar tiaj ne ekzistas en Finnlando, mi admiris la vidaĵon. La domoj estis bone prizorgitaj kaj modernaj kaj la etoso en la vilaĝo estis agrabla kaj afabla.

La urbo Herzberg havas ekde 2006 la oficialan kromnomon *la Esperanto-urbo*. En la urba stacidomo la vojaĝanton Esperante bonvenigas granda ŝildo, kaj la busto de Zamenhof sekvas la viglan trafikon de la traira strato. La plej signifa vidindaĵo estas la Interkultura Centro Herzberg ICH, Germana Esperanto-centro. Bedaŭrinde mi ne havis la eblon viziti ĝin, sed mi trovis ĝin kaj povis foti. Krom ĉi tiuj



Herzberg – Bonvenon. Fotoj: Sylvia Hämäläinen.

esperantaĵoj troviĝas pluraj ŝildoj kaj markoj pri la internacia lingvo.

La vilaĝo Sieber havas verŝajne la plej novan Esperanto-monumenton de la urbo, ĉar la unuan konferencan tagon estis inaŭgurita la memorŝtono de la Ponto de la Espero. La inaŭguron faris kune la vilaĝestro de Sieber kaj la urbestro de Herzberg, kiu cetere flue parolis en la malfermo de la konferenco. Li menciis la proverbon ‘kiu haltas, tiu rustiĝas’ kaj aldonis sian propran opinion: ‘kaj tiu, kiu ĉesas lerni, rustiĝas ankoraŭ pli rapide.’

Al la konferenceto, La domo de Gastoj, oni transiris la Ponton de la Espero. Estis en nia dispono granda festsalono kun scenejo kaj malpli-granda por ekz. la metodika seminario kaj komitato kun ĉ. 20 membroj. En la salono estis belaj surmuren pentritaj bildoj kaj same sur la fona muro de la scenejo granda tipa Harz-mon-



Esperanto-centro.



L.L. Zamenhof en Herzberg.



tara pejzaĝo. Sur la scenejo prezentis en la malfermo kaj vesperaj programoj pluraj regionaj muzik- kaj kantgrupoj. Ni aŭdis belan kolekton de tipa muziko.

En la konferenco partoprenis ĉ. 80 geinstruistoj el 25 landoj. El Finnlando la reprezentantoj estis *Synnöve Mynttinen* kaj *Sylvia Hämäläinen*. Samtempe aliloke okazis Somera Arbara Lernejo (SALO 8) de ĉ. 20 lernejoj el Herzberg kaj Pollando. Ili estis kun ni dum la vesperaj aranĝoj. La komitato havis tri kunsidojn, la seminarioj pri Metodiko kaj pri "Vojoj el konflikto – mediacido" kunvenis ĉiutage krom en la ekskursita tago kaj samtempe kun la seminarioj estis aŭskultablaj pluraj prelegoj. Okazis krome KER-ekzamenoj B2 kaj C1, kaj la skriba kaj la parola partoj.

La komitato elektis novan prezidanton por ILEI, *Mireille Grosjean*, nomumis du Honorajn Membrojn, *Katalin Kováts* kaj *Stefan MacGill* kaj aprobis rezolucion:

*Okaze de la 65-jariĝo de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj la partoprenantoj de la 46a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) esprimas sian gratulon al tiuj membro-ŝtatoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj loĝas al la Homaj Rajtoj, al la Infanaj Rajtoj kaj specife al la Rajto pri EDUKADO, kaj invitas ĉiujn membro-ŝtatojn progresi en tiu loĝaleco kun aparta atento al edukado de virinoj, knabinoj kaj knaboj.*

*Sylvia Hämäläinen*

## El Svedio nova perlo pri Zamenhof

Jam en la jaro 1960-a mi tralegis la verkon de Edmond Privat pri la kreinto de Esperanto. Estis vere fascine surpaperigite. Tute nature mi poste iam kaj tiam restudis tiun belan literaturan perlon. Aperis krome antaŭ miaj okuloj samtemaj klasikaĵoj de Boulton, Ziolkowska kaj Korĵenkov.

Vera bombo eksplodis, kiam en aŭgusto 2013-a aperis en finnaj librovendejoj nova juvelo "ESPERANTO – Drömmen om ett världspråk", do "Songö pri la mondlingvo". Verkis la freŝan eldonaĵon emerita profesoro *Bo Sandelin*, kiu siatempe instruis en la Komerca Altlernejo de Gotenburgo. Tuj ek de la unuaj linioj dum la legado mi sentis varmiĝon de mia sango en la vejna cirkulado.

Tre talente kaj klare la verkisto kribris el abunda materialo trafikajn erojn, kiujn certe sci-voleme legos kaj komencantoj kaj spertuloj. Mia propra lingvo ne estas la sveda, sed tamen al mi plaĉis stile unueca kaj fluanta rakontado. La kovrila historia bildo prezentas demonstrantojn kun flagoj kaj tekstafiŝoj sur la Amirala ponto en Malmö 1927. Riĉaj, kaj raraj ilustraĵoj agrable drolotas la leganton.

La celo de la verko estas kapti la atenton de la granda publiko ekster esperantistaj rondoj. Tiaj publikaĵoj ne abundas. Jen ni krome povas ĝoji pro tio, ke ĝi estas facile havebla en librovendejoj kaj koncernaj retbutikoj. Tuj venis en la memoron aĉeti la libron donace al konatoj kaj antaŭ ĉio al liceanoj, kiuj studas la svedan lingvon en Finnlando. Ankaŭ nekonantoj de la temo facile digestas bele formulitan tekston sur entute 179 paĝoj.

Kompreneble por ĉiuj uzantoj de Esperanto estas grave ekscii pri la nova verko de Sandelin. Li donas ekzemplon sekvindan en la tuta mondo. Belege fluas la frazoj svedlingvaj ankaŭ en la animo de finnlingvano. Dankon kaj gratulon al la aŭtoro. Tion li nepre meritas. Oni trovos trafan analizadon de okazintaĵoj kaj efike inspirajn detalojn. Tio forte vokas al ripeta legado. Aliĝu al la legantoj.

*Jorma Ahomäki*  
(publikigita/recenzita ĉe Pola Retradio en Esperanto)

## Islando spertita de maristoj antaŭ okdek jaroj

*Unto Koskela* (1908–1934) estis verkisto kaj ĵurnalisto, poeto, ano de la siatempa juna finna literatura generacio ”malferminta fenestrojn al Eŭropo”, sed samtempe starinta kun piedoj firme sur la hejmlingva tero. La dialekto de lia naskiĝurbo, *Rauma*, estis la unua finna dialekto ekster la norma literatura lingvo, en kiu estis verkita beletro. Komencis tion *Hjalmar Nortamo* (1860–1931), kaj Unto Koskela estis lia unua postsekvanto.

Islando de jarcentoj provizas Eŭropon per fiŝo. Sijajn partojn volas ankaŭ eksterlandaj entrepre-

nuloj – kiom juste, estas demando ekster nia nuna temo. Ankaŭ finnaj fiŝistoj kaptadis haringojn ĉirkaŭ Islando jam ekde la dudekaj jaroj. Koskela kunveturis en somero 1932 kiel ĵurnalisto raportante al gazetoj. La vojaĝo rezultigis ankaŭ libron verkitan dialekte, ”Valaskaloild ruakka prakkamas” (Rabante manĝon de balenoj). – En la sekvaj linioj estas elĉerpaĵoj el tiu humurplena priskribo pri tio, kiel renkontis Islandon kaj Islandanojn la bunta personaro de la fiŝkapti ekspedicio – kaj kiel helpis ilia lingvoscio.

-tg

### La maristoj kaj fiŝistoj ekkonantaj homojn en la heringa haveno Siglufjördur:

”Ni iris al restoracio, mendis bieron – pli fortaj trinkaĵoj ne estis – kaj ĉirkaŭrigardis. Jam estis multe da homoj, gejunuloj. Iu el ni ekvoĉis: ”Vidu knaboj, ĉu tio eblas? Tie sidas la samaj knabinoj, kiuj antaŭ kelkaj horoj purigis haringojn sur la kajo!” – Kaj vere estis tiel, la samaj knabinoj. Sed tute aliforme nun en amuzejo. Anstataŭ oleŝmiritaj surtutoj ili estis vestitaj en silko kaj veluro, la vizaĝoj anstataŭ haringajokovritaj estis helbelkolorigitaj. Kiel floroj ili aspektis. Kaj rigardante kiel ili elegante fumis, ni frotis la okulojn; ĉu ni troviĝas en Islando aŭ en la t.n. granda mondo. En salona angulo ludis plena ĝaza orkestro.

Strangaj tiuj eskimoj, iu diris. Sed ĉu ili scias danci?

La kapitano petis islandan junulon inviti knabinojn al nia tablo, kaj kelke da ili efektive venis sidi ĉe ni. Ni invitis ilin al danco, ankaŭ mi kuraĝiĝis riverenci al bela eta nigraokula fraŭlino sidanta apud mi.

Ni dancis kelkajn taktojn senvorte. Ankaŭ ĉetable la knabino nenion diris, kaj mi pensis, ke ŝi decidis tute muti. Sed nun ŝi subite ekri-

gardas min kun ĉarma rideto kaj demandas: ”Parlez-vous français?”

Mi kompreneble tute konfuziĝis kaj ne sciis ion respondi. Ja ankaŭ, mi apenaŭ ion sciis france diri. La fraŭlino rimarkis mian senscion pludemandante: ”Of course you speak English?” ”Yes”, mi gaje respondis, ĉar ja maristo angle parolas. Do ni provis konversacii angle, aŭ pli ĝuste mi provis dum ŝi parolis plenflue. Rimarkinte la mizerecon de mia angla ŝi ŝanĝis al la germana lingvo, kiun eĉ mi iagrade majstras. Ree ĉe la tablo, mi ne povis ne demandi: ”Fraŭlino, mi miras, ke ĉi tie haringolaboristinoj tiel vastan lingvoscion posedas, franca kaj angla kaj germana – eble estas postulata ankaŭ ekzameno en la hispana?” Sed tiam ŝi ekkoleris: ”Ĉu vi, senhonta Finlanda fiŝistaĉo, kredas, ke mi venis ĉi tien purigi haringojn! Certe en Islando sufiĉas pli oportunaj laboroj por studentoj, dank’al Dio!”

jen tiel. Mi pardonpetadis kaj sciigis ke mi ankaŭ iam sukcesis abituri. Ŝi repaciĝis kaj ni totis por harmonio.”

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki)  
jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530  
[onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202  
[kimmo.hannula@creavit.fi](mailto:kimmo.hannula@creavit.fi),  
[www.esperanto.fi/jyvaskyla](http://www.esperanto.fi/jyvaskyla)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Väärärjärventie 26 A, 93590 Vanhala [www.esperanto.fi/oulu](http://www.esperanto.fi/oulu)  
[aini.esp@hotmail.com](mailto:aini.esp@hotmail.com)
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla  
[matti.wallius@ebaana.net](mailto:matti.wallius@ebaana.net)
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. [www.esperanto.fi/tampere](http://www.esperanto.fi/tampere) (Jukka Laaksonen: [jvaleto@kolumbus.fi](mailto:jvaleto@kolumbus.fi)  
☎ 050 5829 248)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi) ☎ 050 5494709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi)  
☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki.  
☎ (09) 660 651 [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.  
[fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset

hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). [esperarto@phnet.fi](mailto:esperarto@phnet.fi).

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä. Lisätietoja: Jorma Toropainen, puh. 040 7510535, s-posti [jormato35@gmail.com](mailto:jormato35@gmail.com).

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

## ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna  
aperas dum la jaro

2013

Nro	Limdato	Aperas
5/2013	15.11.	en decembro

### Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo:  
[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

## Vintraĵaj Tagoj en Turku 8.–9.3.2014


Turku kun la loka societo bonvenigas vin al la sekvaj Vintraĵaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando. La tagoj estas aranĝitaj kunlabore kun la loka membroasocio Esperanto-societo en Turku. En la programo estos aktualaj aferoj en formo de publika prelego kaj diskuto kaj kompreneble turismaj vizitoj al famaj vidindaĵoj de la urbo. Ankaŭ okazos la jar-kunveno de EAF. La detaloj aperos plej eble baldaŭ en nia retpaĝoj kaj en la decembra numero de Esperanta Finnlando.

**Bonvenon – Tervetuloa!**  
**Esperanto-Asocio de Finnlando kaj Esperanto-societo en Turku.**

## Talvipäivät Turussa 8.–9.3.2014

Turun Esperantoyhdistys toivottaa tervetulleeksi Suomen Esperantoliiton talvipäiville ja vuosikokoukseen ensi maaliskuussa. Ohjelmassa on yleisötilaisuus ajankohtaisista kieliasioista ja tietenkin kaupungin nähtävyyksiin tutustumista. Seuraa verkkosivua [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi) ja lue Esperantolehden seuraava numero 5/2013.

**Posankka. Porkanaso.**  
**Foto: RB.**



## Amikeca Esperanto-renkontiĝo en Tallinn

La 6an de aŭgusto ĉi-somere en *Tallinn* (Estonio) okazis la unua renkontiĝo de kelkaj esperantistoj, kies hobiaj aŭ profesiaj estas tajĝiĵjano, laŭ la iniciato de *Matti Lahtinen* el Finnlando kaj *Vjaceslav Hromov* el Estonio, kiuj partoprenadis en diversaj Universallaj Kongresoj de Esperanto kaj estas Esperanto-parolantoj. En diskutoj dum la renkontiĝo partoprenis unu el la plej popularaj profesiaj tajĝi-instruistoj en Tallinn, *Sergeo Belov*. Pri la temo ankaŭ interesiĝis Tallinna esperantistino, antaŭa parolistino de Estona Radio en Esperanto, *Eve Otsa*.

Oni interŝanĝis informojn pri la situo en tajĝi-instruado en Finnlando kaj Estonio, paro-

lis pri siaj spertoj kaj pozitiva influo de tajĝi-ekzercado en la ĉiutaga vivo de homoj. *Matti Lahtinen* rakontis pri sia vizito al tajĝi-grupanoj en Ĉinio kaj nuntempa trejnado en Helsinko, pri la laborstilo de sia ĉindevena tajĝi-instruisto kaj tajĝi-kursoj, respondis la demandojn.

Post la renkontiĝo *Matti Lahtinen* konatiĝis kun la bela Malnova Urbo de Tallinn kaj *Pirita*. Li forveturis samtage malfruvespere perŝipe.

La E-renkontiĝo estis sukcesa, ĉar tajĝi-grupanoj decidis daŭrigi amikecajn kontaktojn inter Estonio kaj Finnlando interrete kaj persone, uzante Esperanton.

*Vjaceslav Hromov*  
*fakdelegito kaj tajĝi-grupano, Tallinn*

## Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuussa. Aineisto 15.11.2013 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2013 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)>.